



E·L·T·E
ORIGÓ
NYELVI CENTRUM



Ĉu ...?

Ĉu ankaŭ vi deziras pruvi per oficiala ŝtata diplomo vian lingvoscion pri Esperanto ?

Ĉu vi scias ke en Hungario jare plurmil homoj ekzameniĝas pri Esperanto kaj uzas la akiritan atestilon por havi avantaĝojn en siaj studoj kaj laboro?

Ĉu entute vi scias kiunivele vi konas nian lingvon ?

UEA kunlabore kun la hungara ekzamencentro, aneksita al la prestiĝa budapeŝta Universitato Eötvös Loránd funkciigas novan ekzaminsistemon, laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) de la Konsilio de Eŭropo.

Prezoj

Bazaj prezoj:

70 (B1)- 80 (B2)- 90 (C1) eŭroj

Por landoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Greklando, Hispanio, Irlando, Islando, Italio, Japanio, Kanado, Luksemburgio, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Svedio, vislando kaj Usono.

A-landoj: 44(B1)-48(B2)-54(C1) eŭroj

Ĉeĥio, Estonio, Honkongo, Hungario, Israelo, Kipro, Korea Respubliko, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Portugalio, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Sud-Afriko kaj Tajvano

B-landoj:

34(B1)-38(B2)-42(C1) eŭroj

Argentino, Brazilo, Ĉinio, Rusio kaj ĉiuj supre ne listigitaj landoj.



Sesioj

En **2018** estos KER-ekzamenoj en

Aprilo: Greziljono (FR), Moskvo (RU),

Landaj kongresoj: Kuritibo (BR), San-Marino kaj Zweibrücken (DE)

16a de junio: 7a Tutmonda Ekzameno en

Londono (GB), Parizo kaj Toulouse (FR), Subotica (RS), La Chaux-de-Fonds (CH), Ŝimonoseki (JP), Ĉenduo, Zaozhuang kaj Guangzhou (Ĉinio), Montrealo (Kanado) Eble ankaŭ en Israelo, Tokio kaj San-Francisko !

12 de julio: Raleigh US – NASK

20a de julio - Liptovský Mikuláš - Slovakio dum SES

3a de aŭgusto: UK en Lisbono (PT)

septembro: Poznań (PL), Arkonos

Organizantoj de grandaj eventoj kaj renkontiĝoj, interesataj kunokazi sesiojn, kontaktu

[Katalin Kováts](mailto:Katalin Kováts@ker-ekzamenoj@edukado.net) ĉe ker-ekzamenoj@edukado.net.

Trapasu la KER-ekzamenojn de UEA-ITK

Instituto

La KER- ekzamenoj estas ellaboritaj en **niveloj B1 (komencintoj), B2 (mezniveluloj) kaj C1 (progresantoj).**

Mem la atestilo estas impona, oficiala dokumen-to, verkita en 4 lingvoj

(en Esperanto, angla, germana kaj franca).

La funkciigo de la sistemo okazas kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro ORIGO en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la oficiale rekonataj fremdaj lingvoj.

Nia hungara partnero ORIGO estas plenrajta membro de la

Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo ALTE.

Informo

Detalajn informojn vi povas trovi kaj tuj aliĝi en la paĝaro www.edukado.net/ekzamenoj/ker.

En la sekcio **PRISKRIBOJ** vi povas legi la detalan prezenton pri la postuloj kaj strukturo de la ekzameno.

Vi certe rimarkos, ke kompare kun la malnova IEI-UEA-ekzamenoj en la KER-ekzameno nur en la parola parto estas kelkaj demandoj traktantaj la movadajn kaj kulturajn konojn pri Esperanto, la skriba parto ne entenas tiajn taskojn.

Por interesuloj ni aparte konsilas libere elŝuti la libron [Esperanto de nivelo al nivelo](#), kiu entenas ĉiujn necesajn informojn kaj seriojn de **specimenoj** je ĉiu nivelo de la ekzaminsistemo.

Intervjuo pri la KER-ekzamenoj



Inter 2009 kaj 2017 jam **2012 esperantistoj el pli ol 70 landoj**

trapasis la ekzamenon .

Se ankaŭ vi volas trapasi la novajn KER-ekzamenojn, petu informojn pri la sekvaj sesioj ĉe UEA aŭ rekte de Katalin Kováts, je la adreso